Manfred Hausmann,

Adiaŭ

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉe l' pord' ĉe l' flava gruo diris li
adiaŭ je la lasta foj'.
Aprilo estis kaj la vel-boat'
forglitis sur la akva voj'.

La velon mi ankoraŭ vidis jen,
ĝis en la blu' foriĝis ĝi,
kaj poste nur la larĝon de l' river',
trembrilon sole vidis mi.

Traduko de la Germana poemo "Lebwohl" de Manfred Hausmann *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-903-1802 (2013-06-29 11:50:59)